

Leterkesto, 2-a parto  
Claude Gacond, 195-a radioprelego, 1967.07.05 & 1967.07.08

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtongan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj ĉerpante el nia leterujo.

A.- Ni komencas salutante fraŭlinon Hueter en Clermont-Ferrand, Francio, sinjoro Bruno Siegert en Fürth-Bayern, Okcidenta Germanio, kiu vivas en maljunulejo kaj kies plezuro estas kapti nian radiostacion, sinjoron Marcel Erbetta en Bienne, Svislando, kiu ŝatis niajn dirojn pri la penso de Zamenhof.

Cl.- Sinjoro Kable Singh en Southampton anoncas al ni, ke multaj grupanoj en lia urbo nin regule aŭskultas. Lin multe interesis nia prelego, kiu montris, ke multaj vortoj en esperanto ne obeas la esperantan vortfaradon oficiale instruatan en la lernolibroj. Kaj li petas klarigojn. Li skribis :

A.- « Ĉu vi volis diri, ke tiuj vortoj ne devus ekzisti, aŭ ĉu nur, ke oni devus ekspliki ilin ? La punkto multe interesas min. Mi esperas aŭdi de vi pri tio. »

Cl.- Ni devas ekkonscii, ke inter la lingvo oficiale instruata en la lernolibroj kaj la lingvo parolata sub la nomo esperanto ekzistas diferenco. La lingvo riĉiĝis, nuanciĝis en sia vortfarado.

A.- Tio estas bona kaj pravas, ke esperanto vivas.

Cl.- En la kursoj bedaŭrinde oni kontentiĝas instrui laŭ vortlistoj establitaj antaŭ pli ol kvindek jaroj. Oni instruas afiksojn preskaŭ neuzatajn kaj silentas pri aliaj afiksoj ne listigitaj sed konstante uzataj.

A.- Tion ni celis reliefigi en la prelego, kiun rimarkis sinjoro Kable Singh.

Cl.- Ni donis la ekzemplon de la radiko **horizonto**, kiu fakte formas du adjektivojn ; la linio de la horizonto aŭ la **horizonta** linio, kaj mi tenas miajn brakojn por formi linion, kiu paralelas al la horizonto, por formi **horizontalan** linion.

A.- Ni konstatis, ke el la radiko **universo** oni same formas du adjektivojn :

Cl.- **Universa** leĝo, **Universala** Esperanto-Asocio.

A.- Ŝajnas al ni, ke fakte la adjektivoj en esperanto ludas la rolon de nomkomplementoj :

Cl.- La tuko **de la tablo** aŭ la **tabla** tuko.

A.- La pordo **de la ĉambro** aŭ la **ĉambra** pordo.

Cl.- La linio **de la horizonto** aŭ la **horizonta** linio.

A.- Leĝo valoras en la tuta universo aŭ **universa** leĝo.

Cl.- Kiam la adjektivo fakte ne havas la saman signifon, ol la nomkomplemento, prezentiĝas malfacilaĵoj. Esperanto provis solvi tiun problemon ĉerpante duan radikon: ni havas la radikon **horizonto** kaj **horizontala**, **universo** kaj **universala**, **individuo** kaj **individuala**, **bruto** kaj **brutala**, **centro** kaj **centrala**, ktp.

A.- Ni listigis centojn da tiaj duoblaj radikoj. Fakte temas pri sufikso **al**, kiu formas adjektivojn, kiam la nomkomplemento en **a** havas alian signifon, ol la adjektivo mem.

Cl.- **Denta** formo signifas en formo **de dento**.

A.- La **dentala** ostoj signifas la ostoj, kie kreskas la dentoj.

Cl.- La **centra** punkto signifas la punkto, kiu estas **en la centro**.

A.- Dum **centrala** hejtado ne signifas hejtado, kiu estas en la centro de domo, sed kiu estas centrigita.

Cl. Mi estas **libera** kaj mi estas **liberala**.

A.- **Socia** besto kaj **sociala** sinteno.

Cl.- **Materia** manko kaj **materiala** mondkompreno.

A.- Ĉu vi kaptas la nuancojn, kiujn alportas la sufikso **al** ?

Cl.- Ekzistas en esperanto aliaj tiaj sufiksoj ignorataj de la lernolibroj. Ni menciuj nur la tre uzata **aci** :

A.- Administro, administr**acio**, administrejo, administrado, jen kvar signifoj akiritaj el la sama radiko administri.

Cl.- Administr**acio** inkluzivas la sencojn administrejo kaj administrado.

A.- Same por kooper**acio**, kiu inkluzivas la sencojn kooperado kaj kooperejo.

Cl.- Feder**acio** havas multe pli larĝan signifon ol federado.

A.- Kaj por reveni al la sufikso **al**, Edmond Privat en sia libro **Federala Sperto** uzas la tri formojn : federi, feder**acio** kaj federala. Ĉar nek federo aŭ federado povas anstataŭi la vorton feder**acio**, nek federa povas anstataŭi la vorton federala.

Cl.- Federo aŭ federado havas agnan signifon, dum feder**acio** havas spacan signifon. Federejo ne sinonimas la vorton feder**acio**.

A.- Pri la vjetnama konflikto oni multe parolas en la naciaj lingvoj pri **eskalado**, en la franca **escalade**. Sed tiu litera traduko, pro la tro ekzakta signifo de nia sufikso **ad** ne redonas la ekzaktan taktikan signifon de tiu neologismo. Eskal**acio** solvas tre bone la problemon, ĉar la sufikso **aci** ĝuste formas nomojn, kiuj perdas parton de sia ekzakta signifo.

Cl.- Se vi volas, en la esperanta lingvo de la unua generacio oni estus forĝinta la vorton eskalumi, eskalumo. La sufikso **aci** nun trankvile anstataŭas la artekreitan **um**.

A.- Vi ĝuste uzis la vorton gener**acio**, jen nova ekzemplo de la uzo de tiu neregistrita sufikso **aci**.

Cl.- Jes, kaj se vi trafolias la *Plenan Vortaron* vi trovas la verban radikon **generi** kaj poste la substantivan radikon **generacio**, kiu nek signifas **genero**, nek **generado**.

A.- Nun ni devas respondi al la demando de sinjoro Kable Sinh. Ĉu tiuj vortoj ne devus ekzisti ?

Cl.- Ilia ekzisto jam estas respondo. Ili ekzistas, kaj eĉ vige ekzistas. Provu ilin forigi, kaj ili revenos galope. Ni devas observi nian lingvon, kaj ni rimarkos, ke la esperanta reguleco sin trudas eĉ en la vortkunmetado kun neoficialigitaj afiksoj. Kiam ni konas la ekzaktan semantikan signifon kaj rolon de tiuj sufiksoj, tiam ni kapablos gvidi iom pli bone la esperantan vortfaradon.

A.- La problemo, kiun ni tuŝis, estas tiom vasta, ke ni revenos al ĝi dum serio de prelegoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-